
## PRI DIPLOMATIA VORTARO

Vidu la Januaran numeron. Ni citas nur vortojn kaj esprimojn ne troveblajn, aŭ laŭ ni malbone tradukitajn, en la Angla-Esperantaj vortaroj "Rhodes" kaj "Edinburgh." Grandaparte tiuj terminoj apartenas kompreneble al la leĝoscienco, sed ne ekskluzive. Ni volas atenti ĉiajn aktualajn terminojn de la socia vivo. Kvankam, kie ekzistas, ni sekvas la plej altajn aŭtoritatojn, ni bonvenigas kritikojn de niaj legantoj, precipe neanglalingvaj.

to transfer one's place of residence—translokiĝi: Z, K, B.
finding (as of a Commission)—verdikto: K: senco 2.
to take a vote—voĉdonigi.
if occasion arises—eventuale: K.
to be charged with the duty of—havi la komision.
Council—Koncilio: V(pv), B (pv). "Konsilantaro' ŝajnas tre peza por tiel ofta ideo. Cetere "Konciliano" estus pli preciza ol "Konsilanto" kaj pli oportuna ol "membro de la Konsilantaro." Oni ne pli timu konfuzon, inter politika kaj eklezia koncilioj en Esperanto ol nacilingve, kie oni uzas saman vorton por ambaŭ ideoj.
up-stream—laŭflue: M.
down-stream—kontraŭflue: M.
reentrant (in boundary line)—retroangulo. Ĉe retro vd. V.
median line—meza linio.
High Commissioner—Ĉefkomisaro.
to be domiciled—hejmhavi.
pending (until)—atendante.
to take into account—atenti, konsideri: K.
to reinstate—restarigi: Rhodes. Edinburgh "reenstatigi" ŝajnas tro longa kaj laŭvorta.
to nominate—nominacii (B), nominacii: (M).
sovereignty—regeco: B.
breakwater—ondrompilo: V.
nacelle—gondolo: GM.
to lay down (terms)—dikti
to repatriate—resendi sian landon
concession (governmental)—koncesio: K.
to renounce in favor of—rezigni al: K.
premises (place)—loko(j).
Legation Quarter—Ambasadora Kvartalo.
party (at law)—partio: K.
party of the first part—unua partio.
party of the second part—dua partio.
liberty of action—aglibereco.
personage—moŝto: K((pv).
to prejudice (injure)—difekti.
in virtue of—dank' al: Z, ktp.
subsidiary—akcesora: K, B, V.
plant (industrial)—uzino. V.
effectives (strength of army)—efektivo: V.
unit (military)—unuo: V.
depot (military)—depoto: V.
anti-aircraft—kontraŭaerŝipa.
carrier pigeon—kurierkolombo.
minesweeping—minforigado.
to man—homekipi.
warrant officer—suboficiro.
to break up (ship)—malkonstrui.
in commission (ship)—aktiva.
out of commission—eksigita.
to put out of commission—eksigi.
petty officer—maato: FK 216.
high-power (electricity)—alttensia: V.
to take the air (airship)—ekflugi.

**Mallongigoj de fontoj:** Z.—Zamenhof; FK—Fundamenta Krestomatio; Ekz.—Ekzercaro; K.—Vortaro de Esperanto, de Kabe; F.—Francaj Militdokumentoj en Esperanto; G. samaj de Germanujo; Esp.—la gazeto Esperanto; Jar.—Jarlibro de U. E. A.; V.—Enciklopedia Vortareto, de Verax; R.—La Revuo.
B.—Plena Vortaro, de Boirac; M.—Esperanto-English Dictionary, de Millidge; GM.—Dictionnaire Francais-Esperanto, de Grosjean-Maupin; pv—plivastigo de la senco.

Digitized by Google

## VOCABULARY TEST RESULTS

That word test in our November number was "some test." Ye editor conned the unabridged in despair until Bopomano sent in a 99% (English) translation. The glory of being a "being of superior Esperanto intelligence" falls to Miss D. M. Lynds with a grade of 83. This was a definition exercise, so no mere customary translation was accepted; a knowledge and use of the exact officialized roots was demanded wherever available. Only twenty-three of the words were defined satisfactorily by all competitors; where a single definition seems to us especially "trafa," we give the initial: (a) Abodo; (c) Collins; (l) Lynds; (m) Mann. The translation as we recommend it follows:

1 oranĝo, oranĝkolora; 2 festfajro (m); 3 frapeti, plandriparaĵo, boltingo, krano; 4 eksterbruli (a); 5 envolvi; 6 pajlo: 7 reguli, regi, liniilo: 8 okulharo: 9 san(ec)o, forto, tosto: 10 kupro: 11 malbeno: 12 malĝentila, malkompleza: 13 porkaĵo: 14 molmatura (l), dolĉa: flosanta: 16 gitaro: 17 rapideco, -emo: 18 akcepto (l): 19 kaso, kasejo: 20 civila, ĝentila: 21 ektremo (l): 22 buŝumo: 23 atentinda (a): 24 suda: 25 subtera malliberejo: 26 parolado, legado, prilego: 27 eksteren, -a: 28 doma tubaro (l), fluilaro, fluiligado, plumbistado: 29 rabado: 30 gelatena: 31 akvaĵo, kotujo: 32 robo: 33 muĝi: 34 enkorpigi, enhavi: 35 vindi: 36 senlime valora (m), netaksebla (a), preterpreza: 37 senartifika, naiva, ingenua: 38 avar(ec)o: 39 konsciencema: 40 ĉarto: 41 ruiniĝinta (a): 42 malproporcia (c), malsimetria: 43 priplendi (c): 44 mozaiko: 45 moneraro, mon(er)fabrikado: 46 aparteco, strangeco, malordinareco: 47 perdi pro neplenumo (l), punpagi: 48 sagaca (a): 49 ripozi: 50 Marso: 51 histerio: 52 ludema: 53 simi(ec)a: 54 detondeti: 55 brunulino: 56 majesteco, moŝt(eg)o: 57 jonglisto: 58 laŭtmaĉi: 59 nervo: 60 rilate al, pri, estimo, observi, respekti, konsideri, taksi, ŝati, atenti: 61 barelero, bareltabulo (taŭbo doubtful, tho in Boirac), liniaro: 62 asekuri, certigi: 63 malbone uzi, (misuzi?): 64 lerteco: 65 vag(ad)i: promontoro: 67 instinkta, senpripensa: 68 komploto: 69 patelo (a), konusa molusko: 70 ŝagrino [E. F. G. I. R. T.], grajnoledo (a): 71 kameo: 72 hometo: 73 partero: 74 svitiga: 75 fiŝkapta: 76 teozofio: 77 malvigla (c), rutina: 78 paleologio (m): 79 sofismo (l): 80 ambro: 81 akromata (l), malkolordisiga (m): 82 retroaga: 83 saĝ(eg)a, prudentega: 84 komunumestro, elektitulo: 85 surdemetaĵo, inkrustaĵo: 86 laikaro: 87 okro: 88 marĉejo: 89 flu(parol)a: 90 deklivo, krutaĵo: 91 infuzi, inspiri: 92 rajtigita: 93 harpio: 94 filantropio, homam(ec)o: 98 molulo, vartindulo: 99 malsukcesigi, nuligi, vanigi: 100 altigado, ekĝojego (m), entuziasmo.

---

## CERBUMEJO

### Kondukata de G. W. Lee

(kiu deziras certigi ke tiu ĉi fako interesas sufiĉe da legantoj.)

Jen miaj tradukoj por la anglaj vortoj en III; ankaŭ laŭ "Abodo" (a); Collins (c); Daingerfield (d); Kerr (k); Lynds (l); Prujno (p); Scott (s); la frazoj cititaj el "Esperanto," sep., 1920, entenantaj la vortojn kiuj sugestiis taŭgajn vortojn por la anglaj.

Digitized by Google

11. La vetero estas **malĉiela** (diabolical). La monŝanĝo estis malĉiela (p. 157).—ekstreme malagrabla (a), diablema (c), diableca (l), diabla (d, k, & s).
12. La vetero fariĝis pluva kaj **sinsekve** (in turn) sunbrila. Aŭdiĝis plendoj pri....L. K. kaj Akademio kaj sinsekve ankaŭ kontraŭ.... (p. 159). de tempo al tempo (a), alterne pluva kaj sunbrila (c), pluva kaj alterne sunbrila (d), foje (k), sinsekve pluva kaj sunbrila (l), ree (p), alterne pluva kaj sun(bril)a (s).
13. Li **rimarkigis** (remarked) ke vi forestis hieraŭ. S-ro Page rimarkigas ke ni kreis.... novan animon.... (p. 160). rimarkigis (a), (s), rimarkis (c), rimark(ig)is (d), diris (k & l), notis (p).
14. Kiam oni voĉdonis via propono estis **malakceptita** (turned down). Voĉdone oni malakceptis la proponon....(p. 161). malakceptita (a), elĵetata (c), malakceptata (d, l, &s), malsukcesigita (k), malaprobita (p).
15. Bonvolu prezenti vian peton **skriba** (in writing). ....la baloto devas esti skriba (p. 162). skribe (a, d, k, l, &s), skribite (c & p).
16. Post longa diskutado la propono **voĉdoniĝis.** S-ro Mees voĉdonigis pri tiuj proponoj (p. 162). estis elbalotita (a), estis voĉdonota (c), ekvoĉdonata (d), estis metita al voĉdono (k), estis voĉdonigata (l), donita al voĉo (p), estis submetata al voĉdono (s).
17. Tiu propono **via** (of yours) estas tre bona . Li plendis, ke la propono lia ne estis konsiderata.... (p. 162). via (a, d, k, l, p), la via (c), (Tiu) via propono (s).
18. Tio estas kruda specimeno de kion* ni proponas **fabrikigi** (to manufacture). ....valoras la koston fabrikigi la....kartonaĵojn (p. 163). produkti (a), fabriki (c, k, l, p, s), elfabrikadi (d).
19. Mi ne havas **ajnan deziron** (any desire whatever) por tiu libro. La instruado de ajna lingvo....plibonigas la nacian idiomon (p. 167). kian ajn (a, d), nenian ajn (c), ian ajn k, l, p), tute (aŭ absolute) ne deziras tiun libron (s).
20. Oni ne ĉiam vidas tre klaran **takson** (distinction) inter la signifoj* de "da" kaj "de." ....la instruado de Esperanto alportas....pli klaran takson de la signifo de vortoj kaj juĝon de nuancoj de signifo (p. 167). konprenigo (a), distingon (c, p), diferencon (d, k, l), klarajn diferenc(ig)ojn (s).

***Eraro en la originalo (kio anstataŭ kion); signifojn anst. signifoj)**
**N. B. Interesajn komentariojn de (d) kaj (s) mi esperas enmeti en la marta A. E.**

---

## PRESS NOTICE

The Classmate (chief Sunday School paper of the M. E. Church —Jan. 8, 1921—Esperanto is Growing.

The Evening Capital, Annapolis, Md.—Jan. 12, 1921—Esperanto proposed at League of Nations Meeting.

San Jose, (Cal.) Mercury—Dec. 1, 1920—Esperanto Gains Back Popularity.

Perth Amboy (N. J.) Evening News—Jan. 29 and Jan. 31, 1921 —Exhibit of Esperanto books and magazines at the Library.

St. Petersburg (Fla.) Times—Jan. 8, 1921—Meetings of Esperanto Club.

Digitized by Google

## ENLANDA MOVADO

**Perth Amboy, N. J.**—Dank' al propagandemo de S-ro Fisher, okazis ekspozicio de multaj gazetoj kaj aliaj Esperantaĵoj je la Publika Biblioteko dum la lastaj tagoj de Januaro. Oni starigas kurson.

**Chicago, Ills.**—Propagandan kunvenon prezidis D-ro Ŝimonek Jan. 2, kaj oni starigas kurson.

**Oakland, Calif.**—Lastatempe organiziĝis East Bay Cities Telefona Rondo.

**New York, N. Y.**—Ĉe la barĉo, Jan. 12., de la Esperanto Instituto Harmonio, Prez. Sussmuth rakontis siajn spertojn en Ĉeĥoslovakio kaj Praha.

**Union Hill, N. J.**—Esperanto klason organizis S-ro Sussmuth.

**St. Petersburg, Fla.**—Jan. 5. S-ino Esther Owen-Flint paroladis pri Esperanto. Esperanto Rondo kunvenas ree ĉiun merkredon posttagmeze je 223 XIII Ave. South.

**Roxbury, Mass.**—Klaso de 9 studentoj funkcias ĉe la Roxbury Latin School kaj lastatempe petis duobligi la lecionojn.

**Boston, Mass.**—5a-sabatan kunvenon, jan. 29., de Bostona Esp. Klubo ĉ. 30 ĉeestis. Post ĝoja festeno oni iom diskutis propagandon kaj agadon prikongresan dum la nuna jaro. Oni bonvenigis S-ron Horn el San Jose, Kalifornio, kiu restis kvar tagojn en Bostono. El Washington vizitis la klubon mardon vespere, feb. 1., Kasisto B. P. Mann, kiu venis pro la funebraj solenoj de frato sia.

**Montreal, Can.**—3 klasoj, 30 studentoj. Okazis jan. 12. jara kluba kunveno. Oni anoncis jaran deficiton, $1.16. Oni reelektis: prez. S-ro C. F. Bardorf: vicprez-ojn S-ino L. V. Cowles & S-ro P. L. Pratley: sek. F-ino E. Strachan: kasiston S-ro G. E. Warner.

**New York, N. Y.**—Dec. 15. okazis propaganda kunveno. Jan 16. paroladis S-ro J. F. Morton ĉe la Bahai Biblioteko. La antaŭa Germana Esperanta Societo de N. Y. sendis la tutan monon en sia kaso al malfeliĉaj samideanoj en Germanujo kaj Aŭstrio per Food Drafts, kaj ricevis kortuŝantajn dankleterojn.

**Worcester, Mass.**—Advokato Wm. E. Baff, vicprez. nia, faris paroladon pri Esperanto ĉe klaso de junulinoj—multe da intereso—oni esperas organizi klason.

**Detroit, Mich.**—Oni starigis du novajn kursojn.

**Erie, Pa.**—20 studentoj ĉe la St. John Kanty College. Oni eldonos "La Studento" duonjare.

---

## WORLD NEWS OF ESPERANTO

**SIBERIO**—1. En Vladivostok la Societo "Espero" en ĝia oktobra jarkunveno elektis sian novan gvidantaron: prez. Notario R. Vonago (polo); vp. S-ro Enkur (esto); Sekret. S-ro Balog (hungara hebreo); kasisto S-ro Gurskij (ruso); bibliotekisto S-ro Vitoŝinski (ukrainano); kaj por rezervitaj laboroj S-ro Vladicanskij (ruso).

La societo (strato Svetlanskaja 19) estis fondita en 1897 kaj posedas altvaloran bibliotekon havantan pli ol 2000 diversajn verkojn. Kunveno de gvidanta komitato okazas ĉiun unuan dimanĉon en ĉiu monato.

Digitized by Google

2. Konstantaj publikaj tre sukcesplenaj kursoj estas gvidataj de Samno. Averkieff en la rusa klubejo de Y. M. C. A.
3. Unua publika internacilingva diservo en Vladivostok okaziĝis la 21an de Novembro ĉe oficejo de "Espero." Prezidanto prelegis popularan rusalingvan skizon pri signifeco, historio, kaj nuntempa stato de nia Problemo. Sek. Balog deklamis kun kortuŝanta efiko poemon de Majstro: "Preĝo sub la Verda Standardo." Poste antaŭ la per Esperantaĵoj belege ornamita altaro romkatolika militkaptita Pastro S-ro Bostcarolli el Tirolo preĝis kaj temis pri la nuna krizo de evangelioj de homaramo kaj pri tiuj de Jesuo Kristo. En la feston fermanta parolado, Sekretario diris interalie ke vole-nevole la internaciaj komerc-teĥnikaj kaj oficialaj-administrativaj interrilatoj bezonas nian plej facilan internacian lingvoteĥnikan komunan ilon kaj la servadojn de ties geadoptantoj kaj baldaŭ ni devas ekaŭdi pri la oficiala alproksimiĝo kaj iompostioma alpreno deflanke de la gvidantaj registaroj.
4. La Societo ludis gravan rolon dum la tuta mondmilita tempo kiel ĉirilata centra helpilo por la diversnaciaj Esperantistaj militkaptitoj en Siberio kaj en ties notindaj sukcesoj en la tendaroj kaj urboj. Esper. poeto Baghy (hungaro), Esper. kompozitoro Ŝaroŝi (hungara hebreo), eminentaj propagandistoj S-roj Taubman, Engelman, Szijj, kaj multege da aliaj iliaj kameradoj: germanoj, hebreoj, hungaroj, ĉeĥoj, italoj, diversaj slavoj, rumanoj estos ĉe ni neniam forgesitaj.
5. Multe da eksterlandaj samideanoj vizitis nian rondon, el Japanujo: S-ro militŝipoficiro Oba, registaroficisto Fujisava,(nuntempe en lia Eŭropa rondvojaĝo, delegito de Japanujo por la Haga kongreso), Inĝen. Takahaŝi, Prof. Nakanome; el San Francisco: S-ro Zelinsky, el Kanado: S-ro Boys, el Ruslando: multege da Esp. eminentuloj.

* * * * * *

The Aragona Esperantista Federacio is to hold its 2nd Deliberative Convention of the Iberian Lands at Zaragossa, May 26-8, under the presidency of S-ro Emanuel M. Barnolas. Those interested and desiring to receive the circulars, documents, etc., should enrol as "protektantoj" (1 sm. or over) with S-ro David Maynar, str. Cerdan, 19, pral., Zaragossa, Catalonia, Spain.

Targul-Mures (alias Marovasarheli), Rumania—We have lately received a card from the newly founded Esperanto group and propaganda center there, with salutations and a request for propagandiloj.

The Nature Group of "La Rondo" intends to issue a book "The Eugenic Year," and asks all who occupy themselves with the perfecting of humanity in any way to send their addresses and aims to "La Rondo", Natura Fako, Str. Provenza 156, Barcelona, Spain.

The interesting little Monata Bulteno de Aplech is hereafter to be La Semisto, Mendizabal, 3, Sabadell, Catalonia, Spain, a 12 page monthly at three pesetas in Catalonian and Esperanto.

---

**Edukista Internacio** starigita de francaj sindikalistoj-instruistoj petas aliĝojn.

E. Vittecoq, sek., Sassetot-Bacqueville, ,S. I., Francio.

Digitized by Google

## RECENZA FAKO

**Ŝlosilo de Esperanto, Japana eldono**—36pp. We were delighted the other day when Sec. Lee handed us this new complete "key," sent him by a friend in Japan. In our opinion there is no one instrument for the spread of Esperanto of more value. Remember what the "**key**" means—that the Esperantist possessor can send his letter with a key enclosed to any individual in Japan with the certainty that the recipient will be able to readily work out his meaning. Moreover, much of the 20 page vocabulary, owing to the common ideoglyfs, is intelligible thruout China and Indo-China, and the work of preparing a Chinese key vastly simplified.

There are now in our possession keys in Japanese, Finnish, Hungarian, Russian, Bohemian, Bosnian, Polish, Italian, Portuguese, Spanish, Catalonian, French, Welsh, English, Dutch, German, Norwegian, and Swedish; 18 distinct tongues. We understand that material for a key in Hindustanee (250,000,000 users) is all prepared; it should be in print. An Arabic key would open up to Esperanto all the lands of Islam; all readers of the Koran. Why waste money and time on telling our next door neighbor about our "universal" language until these keys are in print? Let him receive a letter from the antipodes. Meantime, all honor to the Japanese Esperanto Association for their production. Who will help on the good work?

**Manifesto de la "Defenda Ligo Por la Teritoria Unueco de Hungarlando" al la Esperantistoj de la Mondo!**—a 4-page leaflet whose burden is that the nations within Hungary had equal rights and that Hungarians have been cut off from their fatherland. We do not wish to discuss this question here as our real sympathy with Hungary's present trouble has never extended to her past imperialism. We certainly hope that all the lands along the Danube will soon come to mutual better relations. The leaflet, we believe, can be obtained from the Hungara Esperanto Servo.

**Songô de Someromeza Nokto**, (Shakespeare), Briggs—78 pages, paper 2 sh. 3d.; cloth 2 sh. 9d.; leather 5sh. 3d., postpaid from B. E. A., 17, Hart St., London, W. C. 1, England—We are not going to give an extended summary of this translation nor to find any commas left out(if there are any). The book is as nearly perfect as books are made, and the translation a marvel for its fidelity and resource. "I don't see how any mortal could have done it," is the way one expert American translator and lover of the stage put it; and indeed the very spirit of Shakespeare must have guided the translator. We wish to compliment also the B. L. kaj D. S. for the care evidently bestowed upon every detail. This makes the seventh of Shakespeare's masterpieces in translation and print: Hamlet, Julius Caesar, Macbeth, The Tempest, The Merchant of Venice, and As You Like It being already published.

**Invito al la Printempa Foiro de Leipzig,** March 6-12, 1921.—14 pages, illustrated, attractively printed. This is one of the greatest of German fairs and should be of interest to all exporters and importers. Last spring over 14,000 firms had exhibits, and over 100,000 business men from outside Leipzig were visitors.

Digitized by Google

**Ses Noveloj,** Jokaj, Mikszath, Herzeg, Molnar—32 pp., 10 cents post paid from Hungara Esperanto Servo, Budapest, VI., Hajos-u. 15-II. 2 Hungary. These real jewels from old numbers of "La Verda Standardo" and La Revuo" are a treasure for those of other lands. The style of the authors has been delightfully retained by the translators in excellent clear Esperanto. The press work is faultless and the book tho small will be a treasure for every library. Now is the best of times to buy books in mid-Europe.

**Ok Noveloj;** Bennett, Wackrill, 124 pp., 2 sh., at B. E. A.—These eight stories are a translation of slangy English humor, a most difficult task, especially where, as here, it is sought to convey the provincialisms and quaint turns of expression of a district. We doubt whether non-English readers can appreciate all of this somewhat heavy humor. Some of the shorter tales, as "La Letero kaj la Mensogo," or that of the dentist, being international in application, will find an audience anywhere. The main stories center about the "Kvin Urboj," a drear, sticky, smoky district, whose champion, the "matador," is a football player.

Turning to the word content, we feel that many of the neologisms offered are unwise and should have been eliminated by continental reviewers before publication. **Futbalo** is essentially undesirable, since this conveys an entirely distinct sense; **piedpilko** is free from that objection and clearly characterizes the English game; the American game, tho more resembling a **balo,** might well be distinguished as **"Portpilko,"** or better yet **"Batalpilko."** Surely **duONmalantaŭludanto,** etc., are too agglutinative even for Esperanto; the terminology had better be adapted from the field of battle, or taken over direct—"fulbak(ul)o," or preferably not translated until the game is international and a terminology in many languages has grown up.

Other expressions open to criticism are:—**ĵangalo p. 14, enfermo 16, maturulo (?) 17, linĉus 17, anksiaj 17, antaŭENulo 19, kverelo 19, balancis 21, forVIŜataj 22, tram[vagono] 24, malimpliki (certigi?) 24, duono da dekduo (seso) 25, rapidilo (-eco) 27, tondona (vivemiga) 27, veturigis returnEN 28, nerveco (-emeco) 29, nekapablo (-eco), nekompetento (-eco), neklarigeblo (-eco) 31 and 38, KAPTI dormon 38, havis sur EdŭardoN 43, villo (viljo?) 64,** etc. Most of these are rather neologisms proposed than actual errors. [F.]

**La Fianĉiĝo; Lea,** Kivi, Hall—These two short plays are strange to us in America. The first is the farcical story of a tailor in love with a servant of "the quality." The woman turns out a virago and goes back to her former masters, leaves the tailor in the lurch. The humor is lugubrious naturalism, the movement slow. "Lea," on the other hand, is a religious drama in tense key of the time of Christ. "Zakeus, he, did climb a tree, his Lord to see," that is the plot interwoven with the love story of Zakeus' daughter, Lea. The plays are for presentation before a public which already knows and appreciates them in the Finnish original, so should be excellent propaganda. We are glad to notice that the dubious use of kelkiam, kelkie, etc., is not present. Misprints or errors are notably rare; we note okulo (j) n, p. 37, 1. 3; semo de ebleco (?) p. 42; tia estas, kiel diras la famo p. 44, i (n) fanon, p. 54. The use of **transe,** is dubious.

Digitized by Google

## VESPERO SUR LA LAGO

Sur la trankvilaj akvoj de la lago bela
Naĝas boato mia. En la okcidento
La duonlumo brilas kiel oro hela—
Blovetas dolĉa vento.

Silentas ĉio, krom mallaŭta murmureto
De la ondetoj post remilbatado mia,
Kaj malproksima kri' de ia noktbirdeto,
Malgaje melodia.

Kaj dum restadas ni ĉi-tie sur la ondo,
Ŝajnas al mi, ke certe vojon trovis ni—
Vojon de l' sonĝo, kondukanta for de l' mondo—
Per lum' de lunradi',

Kaj ke ni estas nun sur ia sonĝa maro,
Kien ventegoj vintraj venas ja neniam—
Ho, mi volegas ke ĉi-tie sub stelaro
Ni povu resti ĉiam.

J. W. Bishop, Jr.

---

## OFFICE NOTES

We have received a shipment of Carreira & Bemaldo's Curso Elementar de Esperanto, perhaps the best national textbook in existence, certainly the most replete with helps to the learner in the form of tables, diagrams, illustrations, and other up-to-date methods. 160 pages, including large Portuguese-Esperanto and Esperanto-Portuguese vocabularies—a bargain at $.80 postpaid from the Esp. Office.

---

In response to repeated requests for correspondence lessons, Editor H. M. Scott of 1312 Purdy Ave., Moundsville, W. Va., has been induced to undertake this work. (We assure all looking for real study leading to a diploma that a more expert Esperanto teacher would be hard to find).

---

### DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

---

Armand B. Coigne, 193rd Street and Creston Avenue, New York, Usono. Deziras koni personojn interesatajn en int. asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Ne korespondos pri psikismo nek ia temo escepte la asocion, kaj NE RESPONDOS al PK kaj PM kolektantoj.

S-ro Jonas K. Miliauskos, Dideye Vilniaus G-ve, No. 34, Kaunas, Lithuania, Europe.

S-ro Olavi Kronholm, Pori, Finnlando.

S-ro Arthur Cummings, 718 Twelfth St.,N. W., Canton, O., per P. K. il.

S-ro Vladymir Kosytsin, Siberia, Vladivostok, Russia, dez. kor. I. P. K., interŝanĝas P. M.

S-ro Franz Rohrig, Schlosstr. 6, III, Frankfurt A. M. West, Germanio.

S-ro Hideo Jagi, Dai 3 Kotogakko, Kioto, Japanujo, deziras korespondi per I. P. K. kun ĉiulandanoj.

S-ro Inocene Gross, Houŝkova 32.1, Plzen, Ĉeĥoslovakio.

S-ro Fr. Pilny, Husova 187, Jiĉin, Ĉeĥoslovakio.

S-ro N. Rudnicki. U. E. A. no. 7149, Taŝkent, Centra Azio, renove korespondadas, tuj respondos.

S-ro Bruno Colivicchi, Volaterra, Italio, P. M., I. P. K.

Digitized by Google